


BONA ESPERO

Rundbrief für die Freunde, Förderer
und Mitglieder des Fördervereins
"Bona Espero" e. V.

Cirkulero por amikoj, membroj kaj subtenantoj
de Bona Espero



nro 31

Aprilo 1991

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465

BONA ESPERO en marto 1991

DEKJARA JUBILEO DE FIDELA
SOLIDARECO

Dek jarojn da bona helpo, rekta,
rapida kaj konkreta al infanoj en
mizero. Neniam duboj, neniam mal-
klarajoj, ĉiam konkreta akompano
de bonvolaj volontuloj, ĉiam tra-
videbla situacio.

Konstruado de lernejo! Aĉeto de
traktoreto! 6 km da pikdrato por
la bovinpaŝtejoj! Aĉeto de WV-bus-
eto! Konstruado de vasta dormejo
kun duŝilo en ĉiu ĉambro! Konstru-
ado de deponejo kaj garaĝo! Nova
tegmento kaj reformo de la infan-
domo! Novaj akvoinstalajo kaj lav-
ejoj! Telefoturo! Ponto! Pligran-
digo de la lernejo nun okazanta, ktp!

Evidente estus tro longa listo, se
ni citus ankau ĉiujn gelernantojn
de BE en la lastaj jaroj, sed pri
kelkaj ja ni volas raportoj. Estas,
bele, ofte eĉ streĉe, ke ili ne
perdas la kontakton kun ni, ke ili
de tempo al tempo alvenas, iom re-
stas, konsiliĝas, konsoliĝas, mon-
tras la novan edzon, la filon.

Kelkaj iris al la granda urbo, sed
plejofte revenas post iom da tempo
kaj ne malmultaj suferoj, por deno-
ve vivi en la kamparo. Jam lernas
ĉe ni gefiloj de ekslernantoj el
la fruaj sepdekaj jaroj. Kaj estas
belege vidi nun en BE Adarci kaj
Anamaria instrui, José Neto trans-
preni teknikajn taskojn, Josemar
zorgi bovinojn kaj ĉevalojn. Var-
lucia, kiu instruis dum la lastaj
3 jaroj, nun partoprenas specialan
superan kurson por poste eĉ pli
bone kaj kompetente lecionoj.

BONA ESPERO Im März 1991

ZEHNJÄHRIGES JUBILÄUM VERTRAUENSVOLLER
ZUSAMMENARBEIT

Zehn Jahre direkte Hilfe, schnell
und gezielt, für Kinder in Not! Nie
gab es Zweifel, nie Unklarheiten, im-
mer nur zuverlässige Unterstützung
motivierter Mitarbeiter und immer eine
übersichtliche Planung.

Der Bau der Schule! Ein neues großes
Haus mit Duschen in jedem Zimmer!
Ein Vorratshaus! Eine Garage! Kauf
eines Traktors, eines Personen-Trans-
porters und über 6 km Stacheldraht
um die Weiden einzuzäunen! Das Dach
des großen Hauses wurde erneuert und
die ganze Einrichtung, die Wasser-
versorgung verbessert, der Telefon-
mast errichtet und jetzt wird die
Schule vergrößert, usw!

Die Liste würde zu lang, wenn wir
auch alle Kinder erwähnen würden, die
in diesen 10 Jahren in BE gelernt ha-
ben. Aber über einige wollen wir berich-
ten. Es ist schön und manchmal auch
anstrengend, daß sie nicht den Konat-
akt zu uns verlieren, daß sie von Zeit zu
Zeit kommen, etwas bleiben, sich ra-
ten lassen, Tröst suchen, den Ehe-
partner vorstellen oder den Sohn. Ei-
nige sind in die Großstadt gezogen,
aber meistens kommen sie nach kurzer
Zeit mit nicht wenigen Blessuren zu-
rück, um wieder auf dem Lande zu leben.
Schon jetzt lernen bei uns Kinder der
Schüler aus den frühen siebziger Jah-
ren. Schön, daß jetzt Adarci und
Anamaria bei uns unterrichten, José
Neto sich für Technik zuständig erklärt
Josemar für Kühe und Pferde sorgt.
Varlucia, die in den letzten 3 Jahren
unterrichtete, macht jetzt eine
Weiterbildung.

Kiu el vi memoras pri Dorcelina? Ŝi deĵoras kiel infanvartistino ĉe familio de venezuela diplomato en Washington. Tion ĵus rakontis al ni ŝia frato Valdivino, kiu estas militpolicisto, edzo kaj baldaŭa patro. Wadson studas agrarteknikon, Edit lernas en porinstruista lernejo. Ludoviko laboras kiel ŝoforo de la urba kuracisto. Eni edziniĝis al urba policisto kaj en januaro ni baptis ŝian trian filon. Ivany, ŝia fratino, ankaŭ elektis la estontan profesion de instruistino en Alto Paraiso. José Carlos laboras kun sia Patro kiel melkisto kaj bovgardisto en la apuda bieno São Bento. João Dias deĵoras en hotelo en Brasilia, Alessandra lernas en Alto Paraiso en gimnazio kaj zorgas la ses etajn gefratojn; ŝi ofte vizitas nin. Alis loĝas ĉe parencoj en satelita urbo de Brasilia kaj lernas en gimnazio. Alessan kaj Amanda, liaj fratinoj jam vivas kun ni naŭ jarojn; ilia patro mortis kaj ili estas praktike niaj filinoj. Daziza laboras en la vilaĝo kiel infanvartistino ĉe kuracistino kaj ankaŭ daŭrigas la lernadon. Luciene, Lindomar kaj Iracema edziniĝis kaj estas kamparanoj. Josair havas 2 infanojn. Malvina kaj Adriana forlasis la lernadon kaj vivas en la kamparo kun siaj familioj.

Mi citis kelkajn infanojn, ĉar pluraj el vi, kiuj legos ĉi-tiun raporton, memoros certe pri iuj infanoj. Kaj ĉiuj ja povis emancipiĝi, danke al via konstanta helpo!

Kaj la estonteco? Prave vi demandas. Estas nia prioritata celo, ke pluraj ekslernantoj revenu post la diplomado por transpreni iom post iom la respondecon, ĝis kiam la maljunaj geonkloj iĝu superflujaj kaj la ekzistanta infrastrukturo permesu sendependan ekonomion. Pro tio ni akceptis kun entuziasmo la proponon de kelkaj junaj germanaj geinstruistoj, neesperantistoj (sed kelkaj el ili lernantoj de nia lingvo) realigi specialan projekton en BE, t.e. konstrui kaj vivteni profesiigan laborejon, kie niaj infanoj povu lerni bazajn teknikajn nociojn pri pluraj profesioj, kaj tre baldaŭ tiu projekto estos preta por ekfunkcii.

Resp.: Margret Brandenburg
Brinker Damm 24, D-4404 TELGTE
Tel. 02504/8360

Wer erinnert sich an Dorcelina? Sie ist Kindermädchen bei einer venezuelischen Familie in Washington. Das erzählte uns Valdevino, ihr Bruder, jetzt Militärpolizist, verheiratet und bald Vater. Wadson wird Diplom-Landwirt und Edit Lehrerin. Ludoviko fährt den städtischen Arzt. Eni hat einen Ortspolizisten geheiratet und im Januar haben wir ihr drittes Kind getauft. Ivany, ihre Schwester, möchte auch demnächst Kinder in Alto Paraiso unterrichten. José Carlos ist, wie sein Vater, Melker auf dem Nachbargut São Bento, mit mehr als 1000 Rindern. João Dias hilft in einem Hotel in Brasilia, Alessandra geht noch zum Gymnasium in Alto Paraiso und versorgt zusätzlich ihre 6 kleinen Geschwister. Alis wohnt bei Verwandten in einer Vorstadt von Brasilia und geht zum Gymnasium. Alessan und Amanda, seine Schwestern, leben schon 9 Jahre bei uns, praktisch als unsere Töchter, seitdem ihr Vater tot ist. Daziza lernt weiter und versorgt außerdem in ihrem Dorf die Kinder der Ärztin. Luciene, Lindomar und Iracema haben geheiratet und leben auf dem Lande. Josair hat 2 Kinder. Malvina und Adriana wollten nicht weiterlernen und sind wieder zu Hause in ihren Familien.

Wir haben hier nur von einigen Kindern berichtet, in der Annahme, daß viele von Ihnen, die diese Zeilen lesen, sich an einige erinnern werden. Daß alle selbstständig werden konnten danken sie Ihrer dauernden Hilfe!

Und in Zukunft? Eine berechnete Frage! Es ist unser Hauptanliegen zu erreichen, daß viele unserer Ehemaligen nach Beendigung der Ausbildung zurückkommen, um nach und nach die Verantwortung zu übernehmen, bis wir zwei Alten überflüssig werden und die geschaffene Infrastruktur wirtschaftliche Unabhängigkeit garantiert. Deshalb haben wir auch mit Begeisterung den Vorschlag einiger junger deutscher Lehrer angenommen, (Nichtesperantisten, aber einige von ihnen lernen unsere Sprache), um ein besonderes Projekt in BE zu realisieren, das ist Bau und Betrieb einer Berufsschule, in der unsere Kinder die technischen Grundkenntnisse für einige Berufe lernen. Diese Möglichkeit kann schon bald genutzt werden.



Kie estas la laboro?
 Ne bremsebla aktiveco
 por grandigi la
 lernejon!

Wo ist die Arbeit?
 Nicht zu bremsende
 Aktivität um die
 Schule zu vergrößern!

Dum la lastaj dek jaroj ni akompanis niajn plej lertajn infanojn al naciaj Esperanto-kongresoj en São Paulo, Rio, Salvador, Curitiba ktp kaj ni notis, ke tio lasis en ili, eĉ se ili jam forlasis BE, neforgeseblan emon kaj entuziasmon pri Esperanto. Kaj pri tio ni povus verki tute specialan raporton! La plej aĝaj knabinoj nun intencas fondi Esperanto-junular-grupon kun aparta ĉambro en la nova lerneja konstruaĵo. Ilia lastjara partopreno per kantoj, poeziaĵoj kaj dancoj dum la kongreso en Bahia entuziasmigis ilin multe kaj jam ili studas por veturi al la venonta kongreso en Vitoria.

Jen sinteze kelkaj konsideroj pri la laboro en la lastaj dek jaroj. Pro via subteno kaj tiu de la estraro de la asocio Bona Espero en Münster kaj ne laste la raportoj pri ni en la informiloj, ni povas nun kune ĝoji pri tiu bela jubileo! Ek al la venontaj laboroj!

Tiel finas la longa letero el BE
 Kaj kiu emas rekte paroli kun ili,
 jen ankoraŭfoje la tel.n-ro
 0055/61/6461175
 Atentu la tempo-diferencon! En
 Bona Espero estas 4 horoj!

Por la prospero de Bona Espero!
230,-gm Vendado de steloj dum la
 kristnaska foriro en
 Krefeld
600,-gm Por ĉiu vivojaro 10,-gm
 naskiĝfesta donaco de
 'saĝa' sesdek-jarulo

In den letzten Jahren haben wir unsere besten Schüler zu den inländischen Esperanto-Kongressen in São Paulo, Rio, Salvador, Curitiba u.a. begleitet und dabei beobachtet, daß selbst wenn sie BE verlassen haben, eine große Begeisterung für Esperanto geblieben ist. Und darüber könnten wir einen gesonderten Bericht schreiben. Die großen Mädchen möchten jetzt eine Jugendgruppe gründen und dafür einen eigenen Raum in der neuen Schule haben. Im letzten Jahr haben sie Lieder, Gedichte und Tänze während des Kongresses in Bahia aufgeführt und jetzt bereiten sie sich schon auf den Kongreß in Vitoria vor.

Das sind Auszüge über unsere Arbeit in den letzten 10 Jahren. Dank' Ihrer Unterstützung, der des Vorstandes von Bona Espero e.V. und nicht zuletzt der Informationen im Rundbrief über den aktuellen Stand unserer Zusammenarbeit können wir jetzt dieses schöne Jubiläum feiern. Auf zu neuen Taten!

Hiermit endet der Brief aus Bona Espero
 Und wer mit ihnen direkt sprechen möchte - hier ist noch einmal die Tel.nr. 0055/61/6461175
 Beachten Sie aber die Zeitverschiebung von 4 Std.

Für die Entwicklung in Bona Espero!
 230,-DM durch den Verkauf von Sternen
 auf dem Weihnachtsmarkt in
 Krefeld
 600,-DM für jedes Lebensjahr 10,-DM
 Geburtstagsgeschenk eines
 'weisen' Sechszigjährigen

Förderverein "BONA ESPERO" e. V.

Gegründet am 24.03.1981

Eingetragen unter Gem V 1028 - Finanzamt Münster-Stadt

Kto: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60, Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO

Kto: Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 400 100 46, Kto-nr. 2033-99-465

Bona Espero

Kassenbericht 1990

Kasraporto 1990

Einnahmen/elspezoj

Beiträge, Spenden	20.752,07
Bankzinsen	<u>658,29</u>
	<u>21.410,36 DM</u>

kotizoj, donacoj
interezo

Ausgaben/elspezoj

Barzahlung an BE Brasilien	17.536,35
Bankgebühr	0,30
Kontogebühren PGA	26,40
Portokosten für Information, Korrespondenz und Werbung	240,55
Paketgebühren für Sachspenden	1734,60
Lehrmittel	27,00
Druckkosten, Fotokopien	149,35
Bürobedarf	<u>20,78</u>
	<u>19.725,33 DM</u>

kontante al BE Brazilo
bankspezo
kontokotizoj postĝiraj
afranko por informo,
korespondado, varbado
ekspedkostoj por pakajoj
instrumaterialo
preskostoj, fotokopioj
kontormaterialo

Guthaben am 31. 12. 1989	18.053,91
Guthaben am 31. 12. 1990	19.737,94

kontostato 31. 12. 1989
kontostato 31. 12. 1990

Ursula Schwarz

Telgte, 15. 02. 1991

Wie schon häufiger, weisen wir auch in diesem Jahr darauf hin, daß alle oben aufgeführten Ausgaben Spenden der Mitglieder sind. Alle Beiträge werden zu 100% dem Kinderdorf Bona Espero zur Verfügung gestellt. Das relativ hohe Guthaben ergibt sich aus größeren Spenden zum Jahresende.

Ankaŭ ĉi-jare ni volas atentigi, ke ĉiuj supre menciitaj elspezoj estas donacoj de la membroj. Pri la kotizoj disponas 100% la farmbieno Bona Espero. La relative alta kontostato rezultas el pli grandaj ĝiroj je jarfino.